

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtunda Radiostacio, pri Edmond Privat, mondialisto kaj esperantista verkisto. Vi aŭdas la 2-an prelegon pri tiu ĉi temo.

La pasintan semajnon ni menciis, ke la juna Edmond Privat je sia alveno en la nov-jorka haveno respondis al ĵurnalisto informiganta, ĉu oni povas verki poezion en esperanto, per recito de sia poemo *Tre dolĉe sur lago*.

Ni nun ĵetu rigardon al tiu poemo por ricevi ideon pri la elvokiva talento de la juna poeto :

*Tre dolĉe glitadas boato
Vespere sur lago spegula ;
Kaj akvo sub ĉiu rembato
Sulkiĝas kun sono regula.*

*Tre dolĉe forpasas minutoj
Sur ŝipo solece trankvila ;
Nur voĉo mallaŭta de flutoj
Alflugas tra l' nokto lunbrila.*

*Tre dolĉe la flutoj sonĝigas...
Boato fariĝas gondolo ;
La lumoj de l' bordo briligas
Palacojn sub fea kupolo.*

*Tre dolĉe revivas mi horon
De nokt' sub itala ĉielo ;
Sed perdis ĉielo la gloron,
Ĉar nun al ĝi mankas anĝelo.*

Aŭdante tian poemon oni nur povas bedaŭri, ke la juna poeto nur donis al ni du poeziajn verkojn: *Tra l' silento* kaj *Ginevra*. William Auld en sia analizo de nia poezio salutas en Edmond Privat « la unuan veran poeton, kies poemoj ekmeritas la nomon **Poezio** ». Mi citas lin ankoraŭ: « Plej grava kolekto de la Unua periodo de nia poezio estas sendube **Tra l' silento**, en kiu aperis por la unua fojo en la lingvo poemoj, kiuj kunfandis individue personan voĉon kun natura, vivanta lingvo- kaj vers-tekniko. »

Kial do nia talenta poeto silentis post la apero de *Ginevra* en 1913 ? Li nur estis 24-jara, do promesplena poeto. Aŭskultu la plendon de la reĝino Ginevra al sia edzo, kaj vi eble komprenos, kial la poeto silentis por preni la plumon de la ĵurnalisto kaj politikisto por el ĉiuj siaj fortoj defendi la rajton de la popoloj al la paco kaj justeco, por krei sian naŭzon de la militspirito. Dum la aŭdo de tiu respondo de Ginevra al la diroj de la reĝo Arturo vi pensos, ke ni estas en la jaro 1913, ke baldaŭ Edmond Privat defendos dum terura milito la kaŭzon de la sendependiĝo de Pollando kaj vizitos la Majstron Zamenhof, kiu pro troaj suferoj moralaj mortos antaŭ la fino de la buĉado plorante la forpason de miloj da pacdezirantaj samideanoj.

Arturo : *Pri defendo de la patrolando*

La Reĝo devas pensi antaŭ ĉio.

Ĝi estas zorgo vira, ne virina.

Ginevra : *Dum viroj pri milito ĉiam pensas,*

Kaj gloron de l' bataloj preparadas,

Virina penso vidas la suferon

En hejmoj kaj en vivo ĉiutaga.

Ŝi pensas pri patrino, kies filo

Per longa amo jar' post jar' flegita,

Nun riskas ĉiam esti mortfrapita ;

*Pri kamparano, kies ora maro
De belaj spikoj ame kulturitaj
Post plugo kaj semado sur la kampo,
Subite sub ĉevaloj galopantaj
Falĉiĝos en ruinon, kie poste
Li devos kun la korvoj bataladi
Por preni tere kelkajn greneretojn,
Dum ruĝe flamos la vesperĉielo.
Ho, kial devas tiel multaj homoj
Senĉese turmentiĝi pro eterna
Pretiĝo por milito ĉiam ebla ?
Ho, kial reĝoj ne klopodas fari,
Ke paco estu firme certigita?
Kaj kial vi, Arturo, ne postulas,
Ke viaj nobelviroj pli respektu
Almenaŭ dum pactempo la grenkampojn
De tiuj, kiuj faras ĉies panon ?*

Kial reĝoj ne klopodas fari, ke paco estu firme certigita ? Dum la fondo de Ligo de Nacioj, kiam la sprita Clémenceau ridindigis la prezidanton Wilson, kiu estis ŝatinta fondi veran mondan registaron, Edmond Privat plian fojon konstatas, ke la reĝoj kaj regnestroj nur celas pretigi la venontan militon. Sed kun kuraĝo li tamen aktive partoprenas la laboron de tiu Ligo de Nacioj. Li estis tradukisto, kaj eĉ dum du jaroj reprezentis Persujon. Li advokatis favore al mondialismo kaj proponis la adopton de esperanto.

Ni ne havas la tempon detale rakonti pri la laboro de nia samideano inter la unua kaj la dua mondmilitoj. Mi preferas prezenti al vi liajn ideojn koncerne la mondialismon laŭ la verko *Interpopola Konduto* eldonita en 1935. Tiu libro estas la esperantigo de la libro *Le choc des patriotismes* eldonita en 1931.

Bedaŭrinde tiu verko estas hodiaŭ elĉerpita, ĉu en sia franca eldono, ĉu en la esperanta traduko. En 1941, sub la ordono de la naziistoj, la tuta stoko estis detruita, kaj hodiaŭ la firmo Alcan ne montras grandan deziron reeldoni tiun ĉiam revolucion verkon. Ni esperu, ke Universala Ligo baldaŭ reeldonos la esperantan version. La diroj de Privat koncerne Ligon de Nacioj ankoraŭ valoras por UN. Mi do uzas plej ofte Unuiĝintan Nacion kiel ekzemplon anstataŭ Ligon de Nacioj, kiel cetere faris Edmond Privat mem, kiam li prelegis.

En tiu verko Edmond Privat analizas la ĉefan kontraston de nia dudeka jarcento : la klopodojn de la nacioj apartiĝi kaj kuniĝi. Ambaŭ klopodoj estas naturaj, sed pro iliaj kontraŭecoj ili naskas terurajn konfliktojn.

Hodiaŭ la ekonomia, politika kaj jura flankoj de tiu kontraŭeco estas atente studitaj. Sed restas alia flanko malpli esplorita : la tradicioj, moroj, hereditaj ideoj, kolektivaj emocioj, vasta reala mondo ne pli forgesinda ol la mondo de la ciferoj. Edmond Privat esploras tiun flankon, kiel ni vidos venontsemajne.

Vi aŭdis prelegon el Svislando de Claude Gacond pri la porpaca lukto de Edmond Privat. La venontan semajnon ni daŭrigos nian prelegon pri Edmond Privat, mondialisto kaj esperantista verkisto, per la analizo de lia verko *Interpopola Konduto*.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-